

**LI FORIRIS, SIN LAVIS KAJ REVENIS VIDANTA – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

***El evangelio laŭ Jo 9,1-41***

En tiu tempo, Jesuo, elirante el la templo, troviĝis apud denaska blindulo. La disĉiploj demandis Jesuon: "Majstro, kiu pekis, ke tiu homo naskiĝis blinda? Ĉu tiu aŭ liaj gepatroj?". Jesuo respondis: "Nek ĉi tiu, nek liaj gepatroj; sed tiel estas, por ke montriĝu la faroj de Dio. Dum estas tago, Mi devas prilabori la farojn de la Patro, kiu sendis Min. Poste venos la nokto, kiam neniu povas labori. Dum Mi estas en la mondo, Mi estas la lumo de la mondo". Dirinte tion, Jesuo kraĉis sur la teron, kaj farinte el la salivo iom da koto, Li ŝmiris per tio la okulojn de la blindulo. Poste Li diris al li: "Iru lavi vin en la lageto de Ŝiloaĥ", tio estas, Sendito. Li do foriris, sin lavis kaj revenis vidanta.

Tiam la najbaroj kaj tiuj, kiuj antaŭe konis lin almozanta blindulo, diris: "Sed ĉu li estas tiu, kiu sidis kaj petis almozon?". Kelkaj diris: "Vere estas li". Aliaj diris: "Ne, sed estas iu, kiu similas al li". Sed li deklaris: "Jes, tiu estas ĝuste mi". Kaj ili rediris: "Kiamaniere vi ne plu estas blindulo?". Li respondis: "La homo nomata Jesuo faris koton kaj ŝmiris miajn okulojn. Poste Li diris al mi: 'Iru al Ŝiloaĥ kaj lavu vin.' Mi iris, mi lavis min, kaj mi ricevis vidpovon". Tiam oni diris al li: "Kie Li estas?". Li respondis: "Mi ne scias".

Tiam oni kondukis al la fariseoj la iam blindan viron. Sed estis sabato tiu tago en kiu Jesuo faris la koton kaj malfermis liajn okulojn. La fariseoj denove demandis lin, kiamaniere li ricevis la vidpovon. Li respondis: "Li metis iom da koto sur miajn okulojn. Poste mi lavis min, kaj nun mi vidas". Kelkaj el la fariseoj diris: "Ĉi tiu homo ne venas de Dio, ĉar Li ne observas la sabaton". Aliaj diris:

**“Pekulo ne povas fari tiajn miraklojn”. Kaj malsama opinio estis inter ili. Denove ili demandis la blindulon: “Kion vi diras pri tiu, kiu malfermis viajn okulojn?”. Li respondis: “Li estas profeto”.**

**Sed la Judoj ne volis kredi, ke li estis antaŭe blinda, kaj ke nun li ricevis la vidpovon; pro tio ili alvokis liajn gepatrojn kaj demandis ilin: “Ĉu ĉi tiu estas via filo, kiu, laŭ vi, naskiĝis blinda? Kiel do li nun vidas?”. Liaj gepatroj respondis: “Ni bone scias, ke ĉi tiu estas nia filo, kaj ke li naskiĝis blinda; sed kiel li nun vidas, kaj kiu malfermis liajn okulojn, ni ne scias. Demandu rekte lin: li havas plenaĝon; li pri si mem parolu”. Tiel diris la gepatroj, ĉar ili timis la Judojn; ĉar ĉi tiuj decidis, ke, se iu konfesos, ke Jesuo estas la Mesio, li estu forigita el la sinagogo. Tial liaj gepatroj diris: “Li havas plenaĝon, demandu lin”.**

**Tiam ili alvokis denove tiun, kiu estis blinda, kaj ordonis al li: “Diru la veron antaŭ Dio: ni certe scias, ke tiu homo estas pekulo”. Li respondis: “Ĉu Li estas pekulo mi ne scias; unu aferon mi certe scias: ke mi estis blinda kaj nun vidas”. Tiam ili demandis lin denove: “Kion Li faris al vi? Kiamaniere Li malfermis viajn okulojn?”. Li respondis: “Mi jam diris al vi, kaj vi ne aŭskultis; kial vi volas tion denove aŭdi? Ĉu vi ankaŭ volas fariĝi liaj disĉiploj?”. Tiam ili insultis lin kaj diris: “Vi estu lia disĉiplo, ni estas disĉiploj de Moseo. Ni scias, ke Dio parolis al Moseo, sed pri ĉi tiu ni ne scias de kie Li venas”. La viro respondis: “Jen la mirindaĵo, ke vi ne scias de kie Li venas, kaj tamen li donis vidpovon al mi!**

**Oni neniam aŭdis, ke iu donis vidpovon al homo, kiu naskiĝis blinda. Se tiu homo ne venus de Dio, Li tion ne povus fari, ĉar Dio ne elaŭdas pekulojn, sed tiujn, kiuj Lin respektas kaj al Li obeas”. Sed ili respondis al li: “Vi estas en pekoj ekde via naskiĝo, kaj ĉu vi volas instrui nin?”. Kaj ili forpelis lin eksteren.**

**Jesuo renkontis tiun, kiu antaŭe estis blindulo. Kaj, sciante ke oni forpelis lin de la sinagogo, Li diris al li: “Ĉu vi kredas je la Filo de la homo?”. Li respondis: “Diru al mi, kiu Li estas, Sinjoro, por ke mi kredu je Li”. Jesuo diris: “Li estas antaŭ vi: Li estas tiu, kiu parolas kun vi”. Tiam li genuiĝis antaŭ Li, dirante: “Sinjoro, mi kredas!”. Jesuo diris: “Mi venis por juĝi la mondon: tiel nevidantoj vidos, kaj la vidantoj fariĝos blindaj”. Tion aŭdis iuj el la fariseoj, kiuj estis kun**

**Li; kaj ili diris al Li: „Ĉu ni ankaŭ estas blindaj?” Jesuo respondis: “Se vi estus blindaj, vi ne havus pekon. Nun vi male asertas: ,Ni vidas`; tiel via peko restas”.**

La religiaj aŭtoritatuloj kiuj pretendas esti la lumo de la popolo, la gvidantoj de la blinduloj – kiel ili emis esti alvokataj – reale estas ili mem blindigitaj de propra doktrino kiu malhelpas ilin vidi la agadojn de Dio la kreanto. Tio estas kion formulas ĉapitro 9 de la evangelio de Johano.

En ĉi tiu epizodo Jesuo redonas la vidkapablon al iu denaska blindulo, lin sendante al lageto de Ŝiloaĥ. Estas la evangeliisto kiu precizigas kion signifas “la sendito”, kiu estas Jesuo mem. Do Jesuo, kiu sin difinis “lumo de la mondo”, invitas tiun individuon, kiu neniam sciis kio estas lumo, iri renkonte al li. *“Tiu foriris, sin lavis kaj revenis vidanta”.*

Kaj je ĉi tiu punkto komenciĝis la problemoj. Iam trafita de miraklo, la individuo tuj troviĝas imputito. Antaŭ ĉio estas la miro de la najbaroj, de tiuj kiuj lin vidis antaŭe, kiam li estis almozulo, kaj ne rekonas lin. Strange. Kiel povas esti ke ili ne lin rekonas? Finfine li nur li rehavis la lumon en la okuloj, li ne ŝanĝis sian fizionomion. La fakto estas ke kiam oni renkontas Jesuon, kaj lia mesaĝo redonas dignon kaj liberon al la personoj, oni estas la samaj kiel antaŭe, sed oni ankaŭ estas persono tute nova.

Tiu estas la kialo pro kio oni ne rekonas la denaskan blindulon. Kaj, antaŭ la disputo pri “ĉu estas li aŭ ne estas li”, la iama blindulo diras “*Jes, tiu estas ĝuste mi*”. Estas la sama maniero per kiu Jesuo depostulas la dian kondiĉon. Kiam oni renkontiĝas kun Jesuo, la dia kondiĉo de Jesuo estas komunikata ankaŭ al tiuj kiuj lin akceptas. Kiel diris Johano en sia prologo *“Al tiuj kiuj lin akceptis li donis la kapablon iĝi filoj de Dio”.*

Nu, komenciĝas ĉi tie la problemoj por tiu iama blindulo. Unuafoje, kaj eĉ sep fojojn – tiu estas la ĉeftemo de la peco – oni demandas al li kiel oni malfermigis al li la okulojn. Por kompreni tiun ĉi demandon kiu ritmigos la tutan epizodon eĉ sep fojojn, oni devas memori ke “malfermi la okulojn” estis esprimo de iu liberigo de subpremado, kaj estus estinta tasko de la mesio.

Nekapablaj havi propran opinion, kiu ne estus tiu eldirata de la aŭtoritatuloj kaj de la spiritaj estroj, ili kondukas tiun iaman blindulon ĉe la fariseojn, la spiritajn gvidantojn de la popolo. Kial? Ĉar estis sabato. Por la dua fojo Jesuo resanigas iun en iu tago dum kiu estis malpermesate ne nur kuraci la malsanulojn, sed ankaŭ ilin viziti. La sabato – ni tion scias – estis la plej grava ordono, tiu, kiun Dio mem observadis.

Do ili ne kapablas prijuĝi tiun okazaĵon ĉar sendube estas iu pozitiva flanko, sed estas tamen la malobeo de la plej grava ordono. Tiam ankaŭ la fariseoj demandas kiel tiu homo rehavis la vidkapablon. Estas neniam gajo, neniam gratulo pro la fakto ke tiu homo, denaske blinda, estis reakirinta la vidkapablon. Ili volas nur scii la kialon.

Kaj, al kutimiĝintaj ĉiam juĝadi ĉiujn kaj ĉion kun la leĝo enmane, kio estas ilia ununura juĝkriterio, *“Kelkaj el la fariseoj diras: “Ĉi tiu homo” tio estas Jesuo, “ne venas de Dio, ĉar Li ne observas la sabaton”*. La ununura juĝkriterio por la fariseoj estas la obeado al la leĝo, ne la bono de la homo. Por Jesuo, male, la juĝkriterio estas la bono de la homo. Tiu kiu juĝas surbaze de la leĝo, de la doktrino, de iu kodo, estas klara kaj asertas ke Jesuo ne venas de Dio. Aliaj demandadis kiel povus pekulo fari tiujn signojn.

*“Denove ili demandis la blindulon: „Kion vi diras”*. Nekapablaj doni respondon, ili volas ke la iama blindulo donu ĝin al si mem, *“pri tiu, kiu malfermis viajn okulojn”*, estas tio kio ilin maltrankviligas. Maltrankviligas ilin la fakto ke la homo malfermis la okulojn ĉar la religia institucio povas regi la personojn dum la popolo estas blinda, sed kiam ĝi malfermas la okulojn kaj vidas la vizaĝon de Dio kaj la dignon al kiu li ĝin alvokas, la unuaj kiuj eltenas la kostojn estas tiuj kiuj opinias sin reprezentantoj de tiu ĉi Dio kaj reale estas nur la mallumo kiu bremsas tiun lumon de la mondo.

Nu, li respondas: *“Li venas de Dio”*. Dum la fariseoj certis dirante *“Tiu homo ne venas de Dio”*, la blindulo – tiu kiu estis blinda vidas, dum tiuj kiuj vidas estas blindaj – diras: *“Li estas profeto”*, tio estas li venas de Dio. Tiam envenas la judoj. Per tiu vorto la evangeliisto indikas la religiajn estrojn de la popolo; do, por defendi sian doktrinon, tiuj neas la evidentecon. *“Ili ne volis kredi, ke li estis antaŭe blinda, kaj ke nun li ricevis la vidpovon”*.

Por defendi sian teologion, por defendi sian doktrinon, por defendi la leĝon, ili neas la vivon, neas la evidentecon, neas la vivon. Kaj ili timigas la gepatrojn de la iama blindulo kaj ilin pridemandas. Temas pri tre peza

pridemandado, farante subkompreni ke ili estas trompistoj kaj starigas du demandojn: "*Ĉu ĉi tiu estas via filo*" do ili insinuas la dubon ke tiu ne estu ilia filo, "*kiu, laŭ vi, naskiĝis blinda?*" Do temas pri du demandoj. "*Ĉu li estas via filo?*" kaj "*Ĉu li naskiĝis blinda? Kial do li nun vidas?*". La gepatroj respondas ke tiu estas ilia filo, li naskiĝis blinda, kaj ili ne scias kiel li malfermis siajn okulojn, kaj ili diras "*Demandu rekte lin: li havas plenaĝon*". Tio signifas ke li estas plenaĝa, li estas pli ol dektri jaraĝa.

Kaj la evangeliisto notas ke ili diris tion pro timo de la religiaj aŭtoritatuloj, ĉar tiuj jam decidis ke, kiu ajn estus rekoninta Jesuon kiel la mesion, la Kriston, estus forpelita de la sinagogo, tio estas la civila morto. Kun la forpeliĝoj de la sinagogo, konsiderataj pestuloj, oni devis gardi distancon de almenaŭ du metroj pro sekurecaj kialoj.

Ne kontentigitaj, "*ili alvokis denove tiun, kiu estis blinda, kaj ordonis al li: "Diru la veron antaŭ Dio"*, esprimo kiu signifas "konfensu, rekonu, estu sincera, eĉ eventuale je viaj kostoj". Kaj jen do la verdikto: "*Ni certe scias, ke tiu homo estas pekulo*". Do la juĝo de la aŭtoritato devas esti pli valora ol la sperto de la individuo. Laŭ la aŭtoritatuloj, la popolo ne povas havi propran opinion kiu ne estu tiu de ili promulgata.

Nu la respondo de la iama blindulo estas riĉa je sprito. Li diras: "Mi ne eniras teologiajn problemojn kio ne estas en mia kompetento"... "*Ĉu li estas pekulo mi tion ne scias*", do li ne eniras doktrinajn problemojn, li parolas pri sia sperto, "*Unu aferon mi scias: mi estis blinda kaj nun mi vidas*", vi diros ke tiu homo estas pekulo, vi eble volas insinui ke por mi estintus pli bone resti blinda pli ol reakiri la vidpovon pere de iu pekulo, sed mia sperto estas pozitiva: antaŭe mi estis blinda kaj nun mi vidas.

La evangeliisto estas diranta ke ne la doktrino sed la sperto de la individuo estas tiu kiu supervenkas. Estas la supereco de propra konscienco super la doktrino. La doktrino povas diri kion ajn ĝi volas, ke via sperto estas negativa, ke vi estas pekanta, sed se via vivo diras al vi ke tio estas pozitiva, se tio donas kaj komunikas al vi vivon, tio estas kio gravas.

Do la iama blindulo ridindigas la konduton de tiuj aŭtoritatuloj. Li diras "*Ĉu li estas pekulo mi tion ne scias, sed mi scias unu aferon: ke mi estis blinda kaj ke nun mi vidas*". Kaj jen refoje la insistado de la demando: "*Kiamaniere Li malfermis viajn okulojn?*". Tion ili volas scii, kiel li faris por

malfermi al tiu la okulojn. Kaj, per fajna humuro, la blindulo diras: *“Mi jam diris al vi, kaj vi ne auskultis... Ĉu vi ankaŭ volas fariĝi liaj disĉiploj?”*

Ha se li neniam estus tion dirinta, *“Tiam ili insultis lin”*. Kiam la aŭtoritatuloj ne scias kion respondi, ili transiras al insultado. *“Kaj diris: „Vi estu lia disĉiplo, ni estas disĉiploj de Moseo”*. Ili ne sekvas vivanton, sed respektegas mortinton. *“Ni scias, ke Dio parolis al Moseo, sed pri ĉi tiu...”*, estas interese ke en la evangelioj la religiaj aŭtoritatuloj, la Judoj, la estroj, kiam ili sin adresas al Jesuo, aŭ parolas pri Jesuo, ĉiam evitas eldiri lian nomon, kaj uzas malestimon vorton, *“Tiu”*..

*“Pri ĉi tiu ni ne scias de kie Li venas”*. Ili ne konas Jesuon ĉar ili ne konas Dion, ili ne konas la Patron amantan la vivon. La defendantoj de la leĝodona Dio ne povas kompreni la agadojn de la kreanto kiuj ne manifestiĝas en la doktrino sed en la vivo. *“La viro respondis: „Jen la mirindaĵo, ke vi ne scias de kie Li venas, kaj tamen li donis vidpovon al mi!”*.

Por la sesa fojo ni notas la insiston de tiu *“malfermi la okulojn”* kiu estas la gvida fadeno de tiu tuta peco, kaj la iama blindulo, kiu estas almozulo, per sana prudento ridindigas la teologiajn akrobatraĵojn de la estroj. Ĉiuj komprenas ke temas pri dia interveno, escepte de la aŭtoritatuloj. Kaj per sana prudento li replikas *“Oni neniam aŭdis, ke iu donis vidpovon al homo, kiu naskiĝis blinda. Se tiu homo ne venus de Dio, Li tion ne povus fari”*. Estas memevidenta afero. Estas tiom klare....

Kiel eblas ke la aŭtoritatuloj ne komprenas tion? La doktrino ilin blindigis. Por ili, tio kio interesas estas la bono de la doktrino, do la defendo de ilia institucio, kaj ne la bono de la homo. Al ili la bono de la homo ne interesas. Ne dezirante lerni, sed nur instrui, ili vigle rebatas: *“Vi estas en pekoj ekde via naskiĝo, kaj ĉu vi volas instrui nin?”*. Komence de la peco estis la demando de la disĉiploj ĉu estis pekinta tiu knabo aŭ liaj gepatroj pro la fakto ke li estis blinda.

La blindeco estis konsiderata malbena ĉar ĝi malhelpadis la lernadon de la leĝo. Nu, la Judoj, la estroj, ne havas dubojn. Li naskiĝis en la pekado; la homo devas reĝi blinda por pravigi ilin. *“Kaj ili forpelis lin eksteren”*, tio estas forpelo de la sinagogo. Sed tio ne estas granda damaĝo: forpelita de la religio, li trovas la fidon. Fakte, forpelita de la sinagogo, Jesuo lin serĉas kaj lin trovas. La religiaj estroj kiuj ekskomunikas, reale estas ili la veraj ekskomunikitaj.

